

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la vivo en Esperantujo.

Salutis nin poŝtkarte kelkaj samideanoj, kiujn ni hodiaŭ deziras nomi. El Nice (Francio) skribis René Debernardi. Li ŝatas niajn prelegojn. El Hexham (Anglujo) poŝtkarto scigas nin, ke s-ro Johano Brownlee registris nian elsendon de la 24-a de julio por reaŭdigo ĉe la loka grupo. Niaj diroj pri la vivo de la lokaj grupoj instigis s-ron E. Dahlmann el Berlino nin rakonti pri la tiea loka grupo. Li konstatas, ke ĝenerala problemo en Esperantujo estas la manko de la juna generacio. Al lia demando pri la kovrilo « *Ici la Suisse* » ni respondas, ke Radio-Svislando ne metis daton por konservi al la propagandilo daŭran aktualecon.

Lastan dimanĉon mi ĉeestis interesan semajnfino en Ĝenevo. Ĝin organizis la Esperanto-Grupo el tiu urbo kiel regionan renkontiĝon de la membraro de Svisa Esperanto-Societo. La prezidanto de tiu grupo nomata « La Stelo » estas Claude Piron. Li estas tradukisto ĉe la UN-fakaj organizaĵoj. Kiam li laboris en Nov-Jorko, li fondis la Esperanto-Societon de la UN-funkciuloj. En Ĝenevo li laboras ĉe Mond-Organizaĵo por la Sano kiel tradukisto el la rusa, angla kaj kelkfoje esperanta. La ĝenevanoj povas fieri pri tiu prezidanto, ĉar li ne nur estas granda lingva specialisto, sed vigla estro kaj talenta muzikisto. Per sia gitaro kaj dinamismo li kapablis entuziasmigi ne nur la ĝenevajn samideanojn, kiuj nun ekformas kanteman grupon, sed la publikon, kiu nun havas grandan deziron : povi ankaŭ foje lerni tiujn belajn kantojn. Ni do esperas, ke s-ro Claude Piron foje redaktos kantlibron, kiu povos riĉigi nian kantprovizon, kiu tro ofte estas iom magra.

Alia ĝenevano havas menciindan agadkampon. Li nomiĝas Henri Vatr . Se vi aĉetis la ĵus eldonitan libron de Edmond Privat *Aventuroj de pioniro* vi rimarkos, ke la enkondukan noton redaktis s-ro Vatr . Tiu samideano estas amiko de s-ro R gulo Perez, la eldonisto de la fama Stafeto. Li jam korektis multajn presprovaĵojn, kaj atente studas la vortriĉiĝon de nia lingvo. Kun s-ro Piron li prezentis lastjare en Lausanne interesajn rimarkojn pri esperantologiaj temoj.

Dum riĉa varietea vespero ni povis aŭdi en Ĝenevo kantojn el la jida, rusa kaj meksikia folkloroj, poemojn originalajn kaj tradukitajn kaj skeĉojn verkitajn de s-roj Piron kaj Vatr .

Dum la tagmanĝo ni povis diskuti pri la nuna situacio en la mondorganizaĵoj rilate nian lingvon. S-ro Piron montris al ni, kiel la komplikaĵoj kreataj de multlingveco ĉiam pli kaj pli komplikiĝas. La plej bonaj sam-momentaj tradukoj neniam alportos kontentigan solvon, kaj pli kaj pli la internaciaj funkciuloj rigardas al esperanto. Ŝajnas, ke la antaŭjuĝoj kontraŭ nia lingvo iom post iom malaperas. Claude Piron havas la impreson, ke la esperantistaro devus organizi internaciajn konferencojn, kies laborlingvo nur estus esperanto. Ni tro kontentiĝas vivi inter ni. Ni devus havi regulajn kontaktojn kun ĉiuj organizaĵoj internaciaj.

Mi demandis al s-ro Piron, ĉu la mondorganizaĵoj foje ricevas leterojn de esperantistoj. Kaj la respondo estas diskonigenda. Jes, venas leteroj kaj poŝtkartoj de esperantistoj, sed plej ofte ili malbone efikas. Dum la aliaj leteroj skribitaj en la angla, franca aŭ rusa estas kutime verkitaj de fakuloj kaj bone prezentitaj, la leteroj en la esperanta estas plej ofte sensignifaj, supraĵaj kaj terure malbele prezentitaj. Plej ofte la maŝintajpado estas malregula, eraro-plena, malpura, aŭ eĉ tre ofte la leteroj estas manskribitaj kaj preskaŭ ne legeblaj. Tiuj leteroj kaj poŝtkartoj, anstataŭ vekti simpatian favore al nia movado, kreas malbonan klimaton por ni. S-ro Piron pensas, ke la esperantistaro devus rezigni okupiĝi pri agadoj, kiuj malbone efikas. Li donis ekzemplon. Foje aperis alvoko en la UEA-revuo. Ĝi instigis la esperantistojn skribi al la UN-sekretario. Multaj samideanoj obeis. La sekretario ricevis do multajn leterojn kaj poŝtkartojn. Neniu el ili alportis ion alian ol supraĵaj propagandaj diroj. La rezulto estis tre malfavora por ni.

Regionaj renkontiĝoj, kiel tiu en Ĝenevo, estas ege utilaj al nia movado. En Svislando okazas ĉiuaŭtune du similaj manifestacioj, unu por la orienta parto de la lando, unu por la okcidenta. La orienta okazis en septembro en Bregenz ĉe la germana-aŭstria svisa limo. Dum tiuj kunvenoj oni ne kunsidas por diskuti pri la interna vivo de la societo, sed por profundigi en nian kulturon.

Ĉiujare tiuj semajnfinoj permesas al ni malkovri novajn talentojn, kiuj sen tio restus plej ofte nekonataj. Ili ankaŭ permesas al multaj gejunuloj sin riski prezenti skeĉojn, poemojn kaj kantojn. Tiel la membraro rejuniĝas kaj kreskas. Mi pensas, ke speco de konkurso inter la lokaj grupoj de provinco aŭ lando multe efikus por la vigliĝo de la esperantista vivo. Kiel en la UEA-revuo troviĝas tabeloj, kiuj permesas kompari la viglecon de la naciaj societoj, tiel en la landaj gazetoj devus troviĝi tabeloj, kiuj numerigus la grupojn kaj fakajn movadojn laŭ iliaj meritoj. Verŝajne neniuj grupo volus troviĝi ĉe la fino de la numerado, kaj tiu konkurso al la unua loko estus rimedo al la hodiaŭaj rimarkitaj mankoj. Ĉu tiaj konkursoj jam ekzistas, mi ne scias. Al vi tion diri al mi, se en via regiono ili estas organizataj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-